**Universala Esperanto-Asocio**

EKO 2014-46



**AKTIVULA MATURIGO**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

# AMO tuje kaj proksime – la jarŝanĝa oferto

## AMO-6 Modra-Harmonia, Slovakio

13-16 Novembro 2014. Kadre de KAEST. Ĉeftemo: Ciferecigo de la Esperanto-kulturo

La ses temgvidantoj estis: Eva Fitzelová (SK) kun Johannes Mueller (DE); Mélanie Maradan (CH), Michal Matúšov (KuboF – SK), Václav Zouzalík (CZ) kaj Vladimír Türk, (CZ). Vidu detalajn resumojn sube, kaj en la retejo de KAEST.

Lokoj G1-G6 restas asignataj. Kunordigon, malfermon kaj fermon prizorgos Stefan MacGill (HU/NZ).

| | Ĵaŭde 13 | | Vendrede 14 - PUBLIKA | | Sabate 15 | | Dimanĉe 16 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 16.00 | Malfermeto | 09.00 | Oficiala malfermo * | 09.00 | G3 | 09.00 | G5 |
| 16.15 | G1 | 09.30 | Tema malfermo * | 10.00 | G4 | 09.55 | G6 |
| 17.00 | Paŭzo | 09.45 | G1 | 11.00 | Paŭzo | 10.50 | Paŭzo |
| 17.15 | G2 | 10.10 | G2 | 11.20 | G1 | 11.10 | Resumoj kaj forumo |
| 18.00 | Fino | 10.35 | Paŭzo | 11.55 | G2 | 11.40 | Pritakso kaj sekvado |
| | | 10.50 | G3 | 12.30 | Dankoj / fino | 12.00 | Rekomendoj * |
| | | 11.15 | G4 | | | 12.20 | Dankoj kaj fermo |
| | | 11.40 | G5 | | | | |
| | | 12.05 | G6 | | | | |
| | | 12.30 | Dankoj kaj Fino | | | | |

La oficiala malfermo konsistis el salutoj de UEA kaj TEJO kaj lumbilda prezentaĵo pri la AMO-programo ĝis nun kaj por la sekva jaro. La teman malfermon prizorgos Petro Balaž (SK). Ĉiu gvidanto partoprenis la forumon kaj konkludan sesion. Ni volas konkretajn rekomendojn kaj, se eble, laborgrupo(j)n por realigi ilin! KAEST atingis rekordan aliĝnombron: 74. Pli da informoj: kaest.ikso.net.

Jen la detalaj prezentaĵoj:

Mélanie Maradan:


### De papero al ekrano: optika signorekono kaj tekstar-purigado

Libro en biblioteko aŭ arkivo kutime uzeblas nur unuloke, dum skanita teksto facile vojaĝas kien ajn, kaj povas esti diverscele prilaborata fare de komputilaj programoj (ekz. por indeksado, termin-rekonado, tekstar-bazitaj lingvistikaj studoj…). Esperantaj verkoj kies kopirajtoj eksvalidas povus esti pli grandskale skanitaj, optike signorekonataj, aliformigitaj al tekstaroj kaj disdonitaj al vasta publiko. Tiucele bezonatas iom da metodologio: kiel paperinkaĵo iĝu ekrankaraktro? En tiu-ĉi seminario ni kune superrigardos kaj provos iujn ekzistantajn programojn por optika signorekono. Ĉar tiuj neniam tutglate tekstigas enhavojn, poste ni skizos vojojn por purigi tekstaron. Aktiva partoprenado kaj sugestoj de la ĉeestantoj bonvenas. Temos pri vera metiejo – seminarianoj laboros komputile kun retejoj.

Michal Matúšov:

## GBAM laŭ viki-maniero

Galerioj, bibliotekoj, arĥivoj kaj muzeoj (mallongigite GBAM) estas grandaj trezorujoj de homa scio kaj kulturo. Vikimedia movado, kiu kreas la 5-an plej ofte vizitatan retejaron, havas jam sufiĉajn spertojn pri diversaj kunlaboraj projektoj kun GBAM-institucioj. En tiu ĉi seminario mi prezentos kiel laŭ viki-maniero ciferece konservi kaj disvastigi kulturajn heredaĵojn, kiujn vojojn preferi kaj kiujn eviti, kiel uzi modernajn teĥnologiojn por pli bone servi al vizitantoj kaj montros ankaŭ konkretajn sukcesajn ekzemplojn de GBAMa kunlaboro.



Ilustraĵo de Nuance Communications, Inc.

Vladimír Turk:

## Ciferecigado de libroj - spertoj pri ABBY FineReader 11 kaj hejma skanado

La programo ABBY FineReader 11 estas destinita por optika rekonigo (OCR-programo). Ĝi kapablas transformi bildajn formatojn al teksto kaj ebligas amase prilabori jam pretajn bildojn aŭ skani rekte en formatojn PDF aŭ DOC. Prezento de la programo, ĝia uzeblo, funkcioj ktp. Aldone okazos prezento, kiel ciferecigi eĉ dikajn librojn en hejmaj kondiĉoj sen skanilo, malkoste, uzante nur fotilon kun kelkaj helpiloj.

Václav Zouzalík:

## Interretaj arĥivoj

Por konservi ciferecigitajn verkojn eblas uzi publikajn arĥivojn kaj deponejojn. Ni rigardu la plej famajn arĥivojn kaj eksciu pri eblecoj por uzi ilin por Esperanto.

## Kial kaj kiel uzi Krean Komunaĵon

Krea Komunaĵo estas projekto por mordenigi la koncepton de kopirajto. Dum tiu ĉi prelego vi ekscios ion pri kopirajto kaj libera kulturo, kio estas licencoj, kiel kaj kial licencigi viajn verkojn.

Eva Fitzelová (SK) kun Johannes Mueller (DE):

## Vojo de podkasta sono.

Dum kurso ni parolos pri vojo de sono el buŝoj de podkastantoj tra teknikaĵoj kaj programoj al oreloj de aŭskultantoj. Ni montros diversaj iloj por registri, ciferecigi kaj prilabori sonon. Dum kurso ni planas ankaŭ registri ekzemplan vivan podkastan epizodon.

# AMO-7 Vogan, Togolando

27 - 29 decembro 2014. Ĉeftemo: "Konsciigo en la uzado"

Subtemoj: Kreo kaj gvido de lokaj kluboj, Konstruo kaj redaktado de retejoj, Mastrumo de regiona komisiono, Lobiado (koridora agado). Gvidantoj: Afantchao-Biakou Ayao Raymond (TG), Agbolo A. Didier (TG), Mireille Grosjean (CH), Adjé Adjévi (TG) plus unu aŭ du alia(j) togolandano(j) aŭ afrikano(j).

Atentu!! La urbo estis ĵus ŝanĝita de Aneho al Vogan (nur ĉ. 10 km for de Aneho).

La instruisto kaj aktivulo Adjé Adjévi prezentos programon "Prizorgado de Landa Asocio kaj la Afrika Komisiono" kun prezento pri Afrika Agado, la Komisiono kaj la Afrika Oficejo de UEA, de ilia naskiĝo ĝis nun. Skizataj estos disponeblaj rimedoj kaj ideoj pri la komisiona laborplano ĝis 2016. Estos emfazo pri la devoj de landaj asocioj kaj kluboj (informfluoj, kursgvidado, atento al individuaj esperantistoj, motivado

k.m.a.) Okazos diskutoj dum kiuj seminarianoj povos komenti la prezentaĵon, starigi demandojn, fari sugestojn kaj eĉ projektproponojn pri Esperanto en Afriko. La celo estu pli efika kunlaboro je regiona kaj nacia niveloj inter la afrikanoj unuavice kaj inter afrikanoj kaj alikontinentanoj por proksimigo de homoj al agadoj de UEA. La plena teksto estas alkroĉita.





Maldekstre: La planata seminaria salono (SPAMujo); dekstre: Instruado en Vogan.

Kontaktoj: adjevia<ĉe>yahoo<punkto>fr
Pli da informoj: http://unuighotogolandaporesperanto.jimdo.com/amo7-22a-tek/

## AMO-8 Weißwasser, Germanio (apud Cottbus kaj la pola limo)

Dec 28-Jan 3 2015. Kadre de JES. Ĉeftemo: Esencaj elementoj por sukcesa E-organizo
Jen malfrua aldono al la kalendaro! Ok seminarioj ene de la lanĉa jaro! Traktotaj temoj estas financa mastrumado, subvencipetoj; administrado; varbado kaj kreado de afiŝoj, eksteraj rilatoj; FLAM-analizoj, projektmastrumado. Gvidontoj nun elektataj. Proponoj bonvenaj – prefere de personoj kiuj planas (aŭ ekplanos ☺ ) partopreni en JES, la komuna aranĝo de PEJ kaj GEJ – la germana kaj pola junularaj organizoj. Ĉi tie UEA kaj TEJO proksime kunlaboras por realigi la seminarion. Informoj pri JES: http://jes.pej.pl/

## AMO-9 Rio de Ĵanejro, Brazilo

23-27 jan 2015. Kadre de la 50a Brazila Kongreso de Esperanto
Programo kaj gvidantoj preparataj. Informoj: Ana Lobo de Carvalho: annalightworker@gmail.com

**AMO – NIA PLUVIVIGILO!**

Ne nur amo pluvivigas la homan specion, ĝi estas la vojo pluen por nia movado kaj lingva komunumo, kiu ja devas konscie krei siajn sekvajn generaciojn. Tro gravas la tasko por lasi tion al hazardo aŭ agemaj unuopuloj – UEA havas mision preni la gvidan rolon. Vi povas helpi nin en tio!

Donaco al la asocio kun indiko 'por la AMO-progrAMO' estos uzata ekskluzive por pluvivigi kaj kreskigi la programon!

PDF farita de Nuance Power PDF 1.1
Dissendita: 6an de nov., 2014. Ĝisdatigita/korektita: 19an de nov., 2014